


HeberSaVax, alia atingo de kuba bioteknologio



Havano, nov 9 (RHK) Sciencistoj de la Centro por Genetika Inĝenierado kaj Bioteknologio (CIGB) kune kun esploristoj de la kuba sansistemo ellaboris antaŭ jardeko promesplenan vakcinkandidaton HeberSaVax por garanti la postvivadon de pacientoj kun hepata kancero aŭ hepatokarcinomo, patologio kiu ŝijare kaŭzas pli ol duonmilionon da mortoj en la mondo.

Sub la nomo HeberSaVax, la imunogeno estis studita en Fazo I kaj II de klinikaj provoj. Unue, la efiko de la produkto estis analizita en aliaj specoj de solidaj tumoraj lokoj, kaj pli lastatempa esplorado ĉe la Centro por Kirurgia Medicina Esploro (CIMEQ) en la ĉefurbo donis kuraĝigajn rezultojn en la kuracado de hepata kancero.

D-ro C. Francisco Hernández Bernal, klinika direktoro por la disvolvigo de la vakcino HeberSaVax, agnoskis en deklaroj al la gazetaro, ke la postuloj de la nacia reguliga aŭtoritato ankoraŭ devas esti plenumitaj, sed "post 10 jaroj da kontinuaj imunigoj, ni staras antaŭ sekura, tolerebla produkto kaj ke ĉiaj malfavoraj reagoj estas minimumaj", li emfazis.

Aŝkultinte la raporton de la kuracistoj kaj sciencistoj, la kuba prezidento Miguel Díaz-Canel rekonis la laboron de jardeko kaj instigis ilin fini la studon kaj progresi en la reguligaj proceduroj, ĉar la produkto, li

atentigis, plifortigos la traktadon por hepata karcinomo kaj malfermos vojon por testi ?ian efikecon en aliaj kancero-lokoj.

Fonto: R.Rebelde

<https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/304400-hebersavax-alia-atingo-de-kuba-bioteknologio>



Radio Habana Cuba